# Krei E-klubojn en Indonezio

**La jus pasintan septembron mi foriris por la dua fojo al Indonezio kun la celo instrui Esperanton kaj esploreti pri la historio de la movado tie.**

Mi alvenis tien kaj ekinstruis la 25-an de septembro, kaj forlasis Indonezion la 16-an de oktobro. Ĉi-foje mi vizitis 3 insulojn: Sumatron, Batamon kaj Javon, kaj ok urbojn. Aldone al la ses urboj vizititaj en 2009 (Batam, Yogyakarta, Semarang, Bandung, Ĝakarto kaj Bogor) mi vizitis ankaŭ Surabaya (Javo) kaj Medan (en Sumatro). Kvankam la aldono de la du urboj kaj la pli longa restado en Ĝakarto pro la Monda Vegetarana Kongreso kaŭzis ke mi eĉ malpli longe povis resti en ĉiu urbo, mi faris tiun decidon pro du ĉefaj kialoj: unue, en ambaŭ urboj estis jam homoj kiuj ekinteresiĝis aŭ eĉ eklernis, kaj due, mi volis ne tro limigi min al unu el la grandaj insuloj, kiu estas Javo, sed aldoni la duan – Sumatron. Plie, la du urboj estas respektive la dua kaj tria plej grandaj de la lando. Mi instruis al grupoj de 5 ĝis ĉ. 240 personoj en lernejoj, universitatoj kaj privataj entreprenetoj, kiuj kutime instruas la anglan al infanoj, ĉe homoj hejme al plej diversaj interesiĝantoj, al Rotaract-grupoj en Ĝakarto kaj Yogyakarta, dum la Monda Vegetarana Kongreso, al entute iom pli ol 600 personoj. Ne ĉiam temis pri tutkomencantoj. Ekzemple en Ĝakarto, kie Ilia Sumilfia Sondang Dewi kaj Abdul Haris gvidas la lernantojn (el kiuj nur deko povis veni al mia leciono), en Bogor, kie la veterano Rijanto Husadha gvidas instruistinojn kaj kelkajn kadrulojn de la privata lernejo "Kesatuan", kaj en Semarang, kie Imam Prayogo, iama lernanto de Rm. Francis D. Yury, gvidas grupon da studentoj.

Grava antaŭeniro rilate al la pasintjara vizito estas ke ĉi-foje dum mia vizito fondiĝis kelkaj kluboj. Temas pri "Esperiga suno" en Ĝakarto, "Ĉielarka revo" en Bogor, kaj – ankoraŭ sennoma – grupo en Yogyakarta. En Semarang la studentoj nomis sian grupon "Espera arbo", sed preferas simple resti lernogrupo kaj ne jam iĝi klubo kun estraro.



Dum la kvintaga Monda Vegetarana Kongreso, Tumonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA) havis informbudon, kiu estis multe vizitata. Tie dejoris kun mi Ilia Sumilfia kaj Acy Roesmayanti, indoneziaj esperantistinoj, kaj Alan kaj Jennifer Bishop el Aŭstralio. En la unua plena tago mi prelegis pri TEVA, kiel longdaŭra membro de Internacia Vegetarana Unuiĝo, kaj laŭ la volo de la ĉeestantoj donis provlecioneton post ĝi. En la lasta tago interesiĝantoj povis sekvi tuthoran enkondukon al Esperanto. Unu el la vizitantoj de la budo estis maljuna indoneziano, kiu ankoraŭ memoris pri tio ke li kiel puberulo lernis Esperanton de R. Ch. S. Datoe Toemenggoeng. En la 1950-aj jaroj tiu ĉi lasta estis ofta partoprenanto de UK-oj kaj tiutempe prezidantino de la jam longe ne plu ekzistanta Indonezia Esperanto-Asocio.

Kaj ĉi tio kondukas nin al la historio de la movado en Indonezio. Pro la mallongaj restadoj en la diversaj urboj, la plenplena programo kaj la longaj distancoj inter la urboj, mi ne havis multe da tempo por esplorado. Tamen mi intervjuis kelkajn homojn, kaj vizitis la Nacian Bibliotekon. Tie mi trovis plurajn artikolojn el la 1930-aj jaroj pri la tiama movado. Certe mia esplorado ankoraŭ ne finiĝis. Sed gravas ke la movado tie ne plu estas nur 'historia', sed ankaŭ 'aktuala'.

Financa subteno por la vojaĝo kaj la instrumaterialoj venis de la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado kaj de individuoj, al kiuj direktiĝas miaj dankoj kaj tiuj de la indoneziaj esperantistoj.

**Heidi Goes**